# Cignoj

## Tago

Birdoj flugas en aero.
En la aero blankaj birdoj flugas.
En la aero flugas birdoj blankaj.
La suno brilas.
Brilas la suno.
La cielo estas blua.
Blua estas la cielo.
Neg^o estas sur la tero.
Sur la tero estas neg^o.
La tero estas blanka pro la nego.

## Vespero

Nun la birdoj flugas super lago.
La lago estas sub la birdoj.
La birdoj flugas  malsupren.
La birdoj flugas  al sur la lago.
La birdoj  flugas sur la lagon.
Jen la birdoj atingas la surfacon de la lago.
Jen la birdoj estas sur la akvo de la lago.
La birdoj jam ripozas sur la akvo de la lago.
La birdoj flugis, sed la birdoj jam ne flugas.
Ili flugis, sed nun ili ne flugas.

## Nokto

La birdoj dormas sur la akvo.
Fisoj dormas en la akvo.
Dormas bestoj.  Dormas plantoj.
Ciuj vivajoj dormas.
Ciaj vivajoj dormas.
La luno brilas en la cielo.
La steloj brilas en la cielo.

## Mateno

La rug^a brilo de la suno vekas la birdojn.
La birdoj ne flugas sed baldau flugos.
La birdoj komencas kuri sur la akvo.
La birdoj ekkuras sur la akvo.
La birdoj kuras sur la akvo.
La birdoj kuradas sur la akvo.
La birdoj ekflugas de sur la akvo !
La birdoj flugas supren kaj supren.